DIA REGNO

ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 4 (955) • 2022 •

## La revolvero kun nodo — simbolo de paco

Ĉiuj certe vidis la revolveron kun nodo. Ĉiutage ĝi disvastigas la mesaĝon de paco kaj neperforto al milionoj da homoj tutmonde. Unu el la plej ikonecaj artaĵoj de nia tempo, kreita de sveda artisto Carl Fredrik Reuterswärd pro malĝojo post la murdo de John Lennon en 1980. Reuterswärd ekkonis John Lennon kaj Yoko Ono en Svislando, kiam Reuterswärd tie loĝis. Yoko petis lin fari artan tributon al John kaj lia vizio de paco. Komence la skulptaĵo estis metita kiel monumento en Central Park en New York, sed en 1988 ĝi estis transdonita al la Unuiĝintaj Nacioj, kaj metita antaŭ ilia domo en New York. Kopioj de la verko estis poste starigitaj en multaj aliaj urboj tra la mondo kaj fariĝis internacia simbolo de paco.



Neperforto-skulptaĵo en Malmö, Svedio. Fotis Francois Polito. (CC BY-SA 3.0)

## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe Cousson
🖂 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel Polnický;
🖂 Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +420 723 672 335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes Ráczkevy-Eötvös
🖂 Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof Åradsson
🖂 Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Pavel Polnický

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel Polnický
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.


## Enhavo


| | |
|---|---|
| Li faris nenian diferencon inter ni kaj ili | 75 |
| Ekumena diservo dum UK | 80 |
| Garnu vin, animo kara | 82 |
| Historio de Ukrainio | 83 |
| La morto de Peregrino | 91 |
| Informetoj | 95 |
| Kun la suno mi leviĝas | 96 |


## Redaktoraj vortoj

Kara leganto, ĉu eblas esti optimisma en tiu ĉi tempo? Post la malfortiĝo de la kovim-pandemio ni esperis je reiro al la "normala" vivo, sed tiun esperon forte forigis la milito en Ukrainio, almenaŭ por ni, kiuj estas proksimlandanoj. Hieraŭ mi interparolis kun kelkaj fuĝintoj el Ukrainio, kiuj maltrankviliĝis pro la perdita lernotempo de la infanoj, kiuj sidante en sveda klasĉambro ne multon komprenas de la instruo.

Vere, la lastaj jaroj forprenis de ni multon, kion ni antaŭe rigardis kiel ion naturan, ekz. vojaĝi al kaj partopreni en kongresoj, libertempi eksterlande. La timo pri inflacio kaj klimatŝanĝiĝo ankaŭ ne donas al ni multe da espero.

Sed iun esperon mi tamen volas doni al vi – la jarkunveno de KELI, dum la ĉi-jara kongreso en Domaszék, decidis pri la sekvontjara kristana kongreso en Bjalistoko, kie aktiva grupo laboras por fari al ni interesan kongreson, vidu paĝon 95. Tie vi ankaŭ trovas informon pri la Bibliaj tagoj, kiuj okazos en marto 2023 en Trier, Germanio.

Pri la ĉi-jara kongreso ni raportos en la sekvonta numero de Dia Regno.

# “Li faris nenian diferencon inter ni kaj ili”
## Enkonduka prelego dum la kongreso en Domaszék, julio 2022

Philippe COUSSON, FR

*Tiu ĉi prelego ne estas nur la enkonduka prelego pri la kongresa temo, sed la unua el serio de tri.*

### Enkonduko

*"Li faris nenian diferencon inter ni kaj ili"*. Tiu versiklo el la libro de la Nova Testamento, tradicie nomata Agoj, troviĝas en tikla momento de la naskiĝanta Eklezio. Tiun momenton oni nomas aŭ la koncilio aŭ la sinodo aŭ la konferenco de Jerusalem.

La cirkonstancoj estas tiaj – Paŭlo ĵus revenis al Antioĥio el sia unua misia vojaĝo. Kie li pasis kaj ankaŭ en Antioĥio estas en la Eklezio multe da ne-judoj, ne cirkumciditoj.

Tiam troviĝis disĉiploj el Jerusalem kiuj opiniis ke por esti sekvanto de Jesuo oni devas esti ankaŭ sekvanto de la leĝo de Moseo. Tion Paŭlo kaj la Eklezio en Antioĥio volis konfirmon aŭ malkonfirmon de la apostoloj kaj pliaĝuloj en Jerusalem. Li do vojaĝis tien.

Krom Paŭlo, ankaŭ Petro havis rakonton pri novaj kredantoj de la Evangelio de Jesuo inter la ne-judoj, kun la ne kontestebla signo de la Spirito.

La apostoloj konstatinte ke la Spirito faris nenian diferencon inter ni (la judoj) kaj ili (la ne-judoj), ne devigis la novajn kredantojn ne-judajn sekvi la leĝon de Moseo, nur kelkajn regulojn logikajn: ke ili detenu sin de malpuriĝoj ĉe idoloj kaj de malĉasteco kaj de sufokitaĵoj kaj de sango. Dume la judaj disĉiploj daŭre sekvis la leĝojn de Moseo. Eĉ kiam restas malsamecoj, ili ne havas rolon en la agado de la Spirito.

Nia intenco, kiam ni elektis ĉi tiun versiklon, estis komprenigi ke se la Spirito ne faras diferencon inter la disĉiploj laŭ la origino, tiam ni ne devas fari distingon, diferencon inter la homoj laŭ la origino. Kaj la demando estas: kio estas ni? Kio estas ili? Kaj komence, kio estas mi? Kiu estas mi? Kiuj estas ni? Kiuj estas ili? Por ni, kaj por Dio. Kiu Dio diras ke mi estas, ke ni estas, ke vi estas, ke la alia estas?

Kaj ĝuste tiu demando estas antaŭ ni tiel evidenta en la nunaj cirkonstancoj, en multaj lokoj en nia mondo, kiam grandiĝas la emo apartigi, distingi, eks-



kludi, eĉ nei la identecon de la aliaj, kiam oni difinas la homojn en definitivaj kategorioj distingaj.

Mia plano estas unue rigardi tra la uzo de la pronomoj, kio estas la identeco de ĉiu, kiu estas mi, kiu estas ni, kiu estas ili, kio kunigas kaj disigas, kaj ĉu prave. Kaj fine, kio estas la rigardo de Dio al ĉi tiu problemaro.

## Unua parto: mi kaj ni, de mi al ni

Estas do tiu unua demando: *kiu mi estas?* Profunda kaj foje terura demando por la homa menso.

Mi rigardos tra diversaj aspektoj.

Poste, mi venos al apuda demando, kiun Jesuo faris al siaj disĉiploj: Kion oni diras ke mi estas? Tio estas alia aspekto de identeco. Kiel la alia difinas min?

Kaj mi poste rigardos kiamaniere oni povas diri "ni".

Kiu mi estas? Estas diversaj manieroj konsideri ĉi tiun demandon. Kion mi pensas ke mi estas? Aŭ: Kion mi sentas ke mi estas ?

Mi eĉ povas daŭrigi: Kiu mi volus esti? Supozante: Kion mi ne sukcesis esti? Kion mi mistrafis en mia deziro esti iu tia?

Krome: el kio mi estas? Fonto, origino, kaŭzo. Al kio mi estas? Celo, fato, espero. Por kio mi estas? Espero, deziro, plenumo.

Kiu mi konscias, ke mi estas? En tiu konscio pri mia identeco, pri mia persono, pri mia memo, rolas multaj faktoroj, inter ili la sentoj kaj la kompreno. Kiu mi sentas ke mi estas? Ĉu tio, kion mi sentas, kion mi spertas pri mi mem, ĉu tio prave donas al mi identecon?, personecon?

Ĉu mia psiko konscias pri mia individueco, pri mia personeco. Por demandi, *kiu mi estas*?, mi devas unue konscii ke mi estas iu.

Tiu *iu*, kiu mi estas, konsistas el fiziko, materio, korpo, menso, penso, historio. Kaj tia konstato povas esti rifuzata de la menso, kontestata. Kelkaj ekzemple rifuzas kelkajn aspektojn de sia korpo. Aliaj volas disiĝi de la familia historio, dum ĉe aliaj mankas ĝuste la familia historio.

Sed ne nur tio, kio estas mi, povas difini kiu mi estas. Ankaŭ miaj apartenoj povas difini min, Kaj niaj kvalitoj, ĉu mi agnoskas aŭ rifuzas ilin. Kaj same miaj kvalifikoj.

Ĉu do la respondo al la demando: *Kiu mi estas?*, dependas de elementoj ekster mi mem?

Kiam oni parolas pri tia demando, oni parolas pri persono. Persono estas mi, kaj vi ĉiuj unuope. Sed tamen ne forgesu la etimologion de la vorto. Ĝi estas masko. Persono estas masko, ŝajno, ŝajno al mi mem, ŝajno al la aliaj. Al la aliaj, ĉar individueco kunportas aliecon, kaj konsekvence rilaton. Oni ne estas persono, individuo se oni estas sola. Tiam neniu diras, komprenigas ke vi estas, ke vi ekzistas.

Persono funkcias en rilato, ekzistas en rilato, en reto de rilatoj. Kaj en tiuj rilatoj, tiu kiu mi estas, povas esti malsama kun tiu kiu mi ŝajnas, intence aŭ ne. Kaj tiam psikaj problemoj povas ekesti kiam estas tro komplike vivi inter tiu kiu mi sentas esti kaj tiu kiu mi ŝajnas esti por la aliaj. La rilatoj, la komunikado povas suferi kaj suferigi.

La vizaĝo estas la fenestro de la memo, de la persono, de la individuo, la vizaĝo kaj ankaŭ la tuta korpo. En tiu ebla ĥaoso de la personeco, mi devas konscii pri la respondoj al tiuj demandoj: kiel mi volus esti? Kiel mi kredas ke oni vidas min? Kiel mi strebas ŝajni? Narcisismo aŭ memhonto povas estigi gravajn problemojn, krom ke ambaŭ estas fakte mensogoj al mi mem.

Se persono estas masko, ĝi ankaŭ rilatas al rolo, ne en teatro sed en la socio. Miaj kompetentecoj, miaj kvalitoj ankaŭ povas min difini. Sed por tio, oni bezonas havi la ĝustan bildon pri si mem.

Sana personeco inkluzivas mem-estimon, konscion pri la propra valoro. Ĝi ankaŭ postulas memvalorigon. Ĝi ankaŭ havu pri si mem idealon por atingi, plenumi. La rigardo al si mem estas influata de la reagoj de la aliaj, aŭ de la interpreto de la reagoj de la aliaj, pozitivaj aŭ ne, pravaj aŭ ne.

Problemoj venas kiam la identeco estas senvalorigata, tretita de la aliaj, foje ĝis neniigo de ĉia valoro, Problemoj venas kiam la identeco estas rifuzita de si mem pro la propra korpo ne akceptata.

Kiam la identeco, kiam la memo troviĝas ekster la realo, estas revata, plena de envio, de identigo al alia modelo, kiam la emo imiti detruas fakte la propran realon, tiam la deziro esti iu alia estas detruema. Reveno al la realo de la mio postulas internan ŝanĝiĝon mal-facilan.

Ekzistas ankaŭ sufiĉe ofta problemo en la identeco. Temas pri la sindromo de la uzurpanto. Homo, kiu estas agnoskata en la socio pro iu kvalito aŭ kompe-tenteco sentas sin en la malĝusta pozicio, sentas ke la agnosko ne estas prava. Malgraŭ la ĝenerala konsento pri ties kapablo, tiu ne kapablas identigi sin kun tiuj kvalitoj, kaj pensas ke tio estas uzurpado, ne vola sed tamen. Tiu fenomeno estas en diversaj gradoj ofta, ne necese grava.

Identeco, personeco ne povas funkcii se regas la submetado al la fato. Tio detruas fakte la konscion havi propran vivon, propran memon, propran liberon. Tiu fato estas pezo, ĉu el la propra historio, ĉu el la familia historio, ĉu el eksteraj faktoroj.

Post paroli pri kiel homoj povas kompreni, adopti, enigi la respondon al tiu demando: *"Kiu mi estas ?"*, vi komprenis ke tio estas forte ligata al la respondo al alia demando: *"Kiu oni diras ke mi estas ?"* Kiel oni nomas min ? Kiu nomas min ?

Mi jam menciis la fortan efikon de la reagoj, de la rigardo, de la opinio de la alia pri mi, aŭ eĉ de la supozo kiun mi faras pri la rigardo, la opinio de la alia pri mi.

Sed envere, la alia ne konas min. Li nur vidas tion, kion mi lasas videbla, vole-nevole. Tiuj miskonoj postulas reĝustigon, repacigon, do respekton reciprokan.

Mi vivas en ĉirkaŭaĵo, en medio, kun kiu, ene de kiu mi devas vivi pace, bele. En tiu medio, mi havas mian lokon, mian rolon. Min ĉirkaŭas kulturo, arto, religio, filozofio kiuj konsistigas la bazon, la grundon en kiu mi vivas, en kiu mia identeco realiĝas.

En tiu mia mondo, mi anas en tre

diversaj medioj: profesio, klubo, grupo, socia klaso, lingvo, etno, gento, tribo, nacio, popolo, ŝtato, patrujo, civitaneco. Ĉu ĉi tiuj apartenoj difinas min? Ĉu ili estas sufiĉas por diri kiu mi estas? Certe ne komplete.

Pri tiuj apartenoj, mi povas fieri, aŭ inverse honti. Mi povas senti min plene akceptata aŭ nur tolerata, aŭ eĉ rifuzata.

Tiuj apartenoj estas ligataj ĉiuj al rakonto, al mitologio, al simboloj, al ritoj, kiuj portas la kolektivan identecon, al kiu mi ligas min ĉu entute, ĉu nur parte. Ekzemple, por multaj junuloj, gravas la vestaĵoj. Ili indikas aliĝon al kulturo, volon pri aparteno, eĉ se kostas, eĉ se ŝokas la gepatrojn.

Ekzistas en ĉiu tipo de grupo tiel nomata transiga rito, nuntempe ĉe la studentoj, tradicie en tribaj civilizoj. Ili markas modifon de la socia statuso, kaj sekve de la identeco. Nuntempe, pli kaj pli volas montri sian identecon per tatuoj. Tiel imitante modelojn, ili esprimas sian identecon per simileco. Strange, ĉar, kiel la aŭtoro Amin Maalouf skribis: *”Mia identeco estas la fakto ke mi estas identa al neniu alia persono.”*

En tiu imita sinteno troviĝas unu karaktero de la identeco, de la respondo al la demando *”kiu mi estas”*, per, kaj distingiĝo kaj imitado, kaj opono kaj solidareco, kaj aparteno al familio kaj foriro simbola de la familio.

La identeco, disvolviĝas ene de konfliktoj, internaj kaj eksteraj, kaj tiuj konfliktoj lasas vundojn, foje tre malfacile resanigeblaj. La familia historio povas kunporti spurojn neelteneblajn. Same la kunteksto de la ĝenerala historio, ekzemple en disŝiritaj familioj meze de militoj.

Mi ne detaligos, sed estas alia aspekto de tiu: *kiu mi estas*. Temas pri kiu mi volas esti sur la diversaj elektronikaj retservoj, kie oni povas preni pseŭdonimon. Tiam oni kaŝas sin malantaŭ avataro, oni rakontas pri si mem, sed fakte pri tiu, kiu tiu avataro, kiu estas si mem kaj ankaŭ malsama al si mem. En tiuj medioj oni povas esti aŭ si mem, aŭ iu alia, aŭ io meze. Tiaj situacioj ofte permesas reagojn, kiujn oni certe ne havus en la vera vivo, ekzemple ĝis insultoj.

Mi nun parolos pri tiuj kiuj spertas plurajn identecojn, plurajn *“mi estas”*.

Elmigrantaj homoj kunportas sian kulturon en alian medion, elradikiĝas kaj provas integriĝi: persona identeca malfacilo, batalo, por ne paroli pri la infanoj.

Simila identeca problemo estas tiu de adoptita infano, kiu volas, bezonas koni siajn radikojn por povi diri: *”mi estas tiu, tia.”* Eĉ aliaj ne volas koni siajn originojn, eble ĝuste por ne travivi malfacilaĵojn.

Rilate al tiu problemo mi volas mencii la kazon de la tiel nomataj "triakulturaj infanoj", kiu daŭras kiam ili estas adoltoj. Temas pri la infanoj kiuj estis, pro la laborloko de la gepatroj, edukitaj en alia lando, meze de alia kulturo. Kiam ili revenas al la lando de la gepatroj, ilia lando, ili ne plu plene apartenas al tiu kulturo en kiu ili ne kreskis. Ili estas triakulturaj, tiu de la familio, tiu de la lando (aŭ eĉ landoj) kie ili kreskis kaj la tria kiun ili mem konstruis per la brikoj de

ambaŭ fontoj. Tio estas la kazo de la infanoj de diplomatoj, de misiistoj, de komercistoj aŭ inĝenieroj, de ĵurnalistoj, ktp.

Oni do vidas ke diri *”Mi estas tiu”* ne nur dependas de mia propra sento, sed ankaŭ de la medio ene de kiu mi vivas, de la alia kiu min vidas.

Ni ankaŭ povas kompreni ke tiu identeco ne estas nur *”Mi estas tiu”* sed krome estas *”ni estas tiuj”*. La identeco estas ankaŭ kolektiva. Oni apartenas al iu *“ni”* kiam oni eniras en la rakontadon de tiu *“ni”*, kiam oni fieras diri *“ni”*

Sed, inverse, ĉu la *“ni”* en kiu mi metas min, en kiu mi sentas min, ĉu sufiĉas por difini min?

Certe ne. Kiel vi eble jam komprenis, identeco, memo, mio, tio estas dudirekta: identeco en la daŭrado *“Mi estas la sama kiel hieraŭ”*, en la loko kaj historio *“Tie kaj tiam mi estas”*, en imagaĵo *”Mi revas kiel la samuloj”*, en kutimoj *“Mi enskribiĝas en ili”*, en lingvo *”Mi parolas kiel ni”*, kaj samtempe ĝi estas distinga, disiga, unika tra diferenciĝo, novaj apartenoj.

Mi estas mi mem, unika, kaj mi estas mi mem identa al *“ni”*, samtempe.

Venontafoje, mi rigardos en alian direkton. Se mia identeco, se mia memo, se mia mio estas difinita per ambaŭ pronomoj *“mi”* kaj *“ni”*, kio pri la aliaj, kio pri la *“vi”*, kio pri la *“ili”*.

---

*Karaj,*

*Jen Biblia vorto por la 8. – 14. de aŭgusto 2022. Ĉi-tie la emfazo de la vortoj de Jesuo estas sur tio, ke ni estas ne nur liaj sekvantoj kaj disĉiploj, sed ke ni ankaŭ povas havi parencan rilaton kun li. Ĉu ne estas mirindaĵo pripensi, ke vi estas frato aŭ fratino de la Filo de Dio? Kiu rilato povus esti pli proksima, pli intensa, ol tiu?*

*Sincere,*
*Jerald Veit*

*

Kaj jen alvenis lia patrino kaj liaj fratoj, kaj starante ekstere, ili sendis al li, vokante lin. Kaj homamaso sidis ĉirkaŭ li; kaj oni diris al li: Jen via patrino kaj viaj fratoj ekstere vin serĉas. Kaj li respondis al ili, dirante: Kiuj estas mia patrino kaj miaj fratoj? Kaj ĉirkaŭrigardante tiujn, kiuj ronde ĉirkaŭ li sidis, li diris: Jen mia patrino kaj miaj fratoj! Ĉar kiu ajn faros la volon de Dio, tiu estas mia frato kaj mia fratino kaj mia patrino.

(Marko 3:31–35)

# Ekumena diservo dum UK

## Dimanĉon, la 7-an de Aŭgusto 2022

Raportas Hans Becklin, Usono

Dimanĉon, la 7-an de Aŭgusto en Montrealo, Kanado, okazis la tradicia ekumena diservo kadre de la Universala Kongreso.

Tamen, tiu ĉi diservo estis konsiderinde malsama kompare kun tiuj, kiujn mi ĝis nun ĉeestis dum Universalaj Kongresoj, pro tio ke ĝi enhavis kiel sian duan parton protestantan meson laŭ la anglikana ordo en Adoru. La liturgio kongruis kun la situo, la anglikana katedralo Christ Church troviĝanta iom kontraste en la vigla urbocentro de tiu ĉi franclingva kaj historie katolika metropolo, kvankam tuj apud la plej grava anglalingva universitato de Kanado, McGill.

Kompletigis tion ĉi celebrado fare de la loka anglikana pastro Joel Amis, kies aktiveco dum la kongreso ne limiĝis al diservado — estante membro de la LKK de la 107-a UK, lia laboro estis plurkampe necesa.

Predikis mi, la usona luterana pastro Hans Becklin, pri Luko 12:32–40 laŭ la Reviziita Komuna Legaĵaro (uzata, inter aliaj, de luteranoj kaj anglikanoj en Usono kaj Kanado, kaj kiu siavice baziĝas sur la Roma Legaĵaro pretigita post la Dua Vatikana Konsilio samtempe kun la Misalo de Paŭlo VI). Mia predikaĵo esploris la diversajn nuancojn de la diro de Jesuo, en kiu li petas sian etan gregon de disĉiploj ne timi, ĉar la Patro jam donis al ili la regnon.

Sekvante la plej fruan tradicion de la eklezio (kiu tamen estas iom fremda al la nuntempa praktiko de la okcidentaj eklezioj, restante ĝenerale konata nur en la orientaj), la diservo estis dividita en du partojn, la diservon de la kateĥumenoj kaj la diservon de la fideluloj. Formale, nur la unua parto estis la Ekumena Diservo, kiu enhavis plurajn himnojn, ĉiujn legaĵojn, la predikaĵon, kaj finiĝis per komuna konfesado de la fido per la simbolo de Niceo.

Post paŭzo kaj poreŭkaristia alivestiĝo fare de la gvidantoj, sekvis la unuan parton la komuna meso Luterana-Anglikana, konkreta pruvo de la ekumena kunlaborado de tiuj ĉi konfesioj ne nur en







apartaj landoj, sed ankaŭ internacie. En 2019, la luteranaj kaj anglikanaj eklezioj de Usono kaj Kanado formale rekonis en siaj asembleoj tion, kio jam de jardekoj neformale ekzistis en la praktiko, nome, ke la kvar eklezioj inter si konsentas pri ĉiuj gravaj dogmoj kaj povas je ĉiuj niveloj rekoni la validecon de la aliaj. Por ni esperantistoj, tio kulminis en la komuna celebrado de la meso fare de pastro Amis kaj mi, splende vestitaj respektive en kazublo kaj dalmatiko kaj nerekoneble de malsamaj konfesioj. Oficiale, ĝis tiu deklaro tio ne estus lica, malgraŭ jardekoj da kunlaboro, pro interkonsentoj inter luteranoj kaj anglikanoj, kiuj ĉesis validi ĉe la landlimo.

La diservo daŭris 90 minutojn kaj enhavis proksimume 65 ĉeestantojn ĝis la paŭzo inter la du partoj. Tiam foriris manpleno, kvankam restis multaj pro la beleco de la muziko kaj la liturgio. La himnojn elektis la planantoj ĉefe por speguli la diversecon de himnoj luteranaj kaj anglikanaj, ĉiam atentante la legaĵaron. Sed ankaŭ aliajn partojn de la kristana historio ĝi reprezentis. Dum la procesio je la komenco, la homoj kantis *Patro Nia, Ni Alvenis*, originale verkitan de Clarence Bicknell por la 6-a Universala Kongreso en Vaŝingtono kaj unike kunplektantan fadenojn kristanajn kaj esperantistajn en unu pledon antaŭ Dio. La muziko etendiĝis ankaŭ en la komunan tradicion de la okcidenta eklezio, kun gregoriaj ĉantoj kaj diversaj rondeloj. Gvidis la muzikon kanadaj orgenisto Andrew Sly kaj ĉefkantisto Ĵenja Amis. Helpis uson-anoj Tony Harris kaj Brajeno Harmon.

Komuniiĝis trideko da homoj divers-konfesiaj kaj diverslandaj, laŭ la praktiko inter kaj anglikanoj kaj luteranoj en Nord-Ameriko, kiu bonvenigas al la altaro iun ajn baptitan kristanon sendepende de ties konfesia aparteno.

Kvankam la grego kunveninta estis, honeste dirite, eta — almenaŭ laŭ mia ĉiudimanĉa normo — mi povas honeste diri, ke malmultaj spertoj de komuniado de la fideloj same emociigis min dum mia pastreco kiel tiu ĉi. Venis ni, nemalofte trans oceanojn, por ekkoni unu la alian, kaj jen ni estas — ne nur parolantaj unu komunan lingvon, sed fandiĝantaj en la unusolan korpon de Jesuo pro la unu pano kaj la unu kaliko, malgraŭ malsamecoj, kiuj devus nin dividi. Kaj sonas nove kaj freŝe tiuj ofte de mi ripetataj vortoj, kiam mi diras ilin en Esperanto:

> *Jen la Korpo de Kristo, la pano de la ĉielo. Jen la Sango de Kristo, la kaliko de la savo.*



---

Hans Becklin estas luterana pastro en Pensilvanio, Usono, instruisto de Esperanto, tradukisto, kaj membro de la Akademio de Esperanto.

Fotis la oficiala kongresa fotisto John Huang

# Garnu Vin, Animo Kara

Originale verkita en la germana lingvo de Johann FRANCK
Tradukita en Esperanton de Hanso BECKLIN
Kantata laŭ la melodio SCHMÜCKE DICH, komponita por ĉi tiu teksto de Johann CRÜGER

Rimarko de la tradukinto: Ĉi tiun faman luteranan himnon pri la sankta manĝo jam tradukis Montagu C. Butler (vidu Adoru 842 /red.). Tamen, la forpasinta kvakero ne transdonas la abundajn aludojn al la eŭkaristio (ĉu pro sia fonto-teksto, ĉu pro siaj propraj konfesiaj opinioj). Responde al tio, mi tradukis ĉi tiun tekston por la komuna meso de anglikanoj kaj luteranoj okaze de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo, Kanado. Mi elektis la tri plej famajn strofojn (kiujn aldone elektis Baĥo por sia kantato laŭ ĉi tiu himno) kaj ankaŭ tiun, kiu plej bone kongruas kun la evangelio de la tago.

1 Garnu vin, animo kara,
el mallum', pro pek' amara,
venu en la oran brilon,
en profundan viv-azilon!
Gracoplene la Sinjoro
vin gastigas kun fervoro.
Ho, regant' de firmamento
tenu min sub ĉi tegmento.

2 Fianĉin', aliru haste
Promesiton, senprokraste,
Lin, kiu ĉeporde frapas
kaj ĉe la altar' agapas.
Vi malfermu la pordegon,
petu l' Alfon kaj Omegon
veni nun al la amato
resti ĉe ŝi kun kompato.

3 Ho, ĉiela filantropo
min purigu per hisopo
por ke mi, povra ploranto
rajtu je grac-provianto!
Mi soifas eliksiron
por forigi la deliron.
Unusolan oni konas
ĝin en graco Dio donas.

4 Ho, Jesu', la pano vera
same mastra kaj kelnera
min invitu al la tablo,
min manĝigu kun afablo.
Per nutrad' de la animo
kaj ĉeesto en proksimo
min pretigu kun precizo
por gastad' en Paradizo.

# Historio de Ukrainio

## Kluba prelego por Esperantista Klubo Brno, majo 2022

Oldřich Arnošt FISCHER, CZ

Senkulpigante insideman atakon de sia armeo kontraŭ pacema Ukrainio ruslanda diktatoro publike proklamis, ke teritorio de Ukrainio apartenas al rusoj kaj Ukraino ne estas nacio.

Ĉu tio estas vero?

Teritorio de Ukrainio estas setlita jam antaŭ 150 000 da jaroj. Tiam tie vivis neandertaluloj. Ĉirkaŭ antaŭ 35 000 da jaroj aperis *Homo sapiens* de moderna tipo.

### Kulturoj malnovaj

Inter la jaroj 5 500–2 750 a.K. inter Karpatoj kaj Dnipro, sur teritorioj de nuntempaj Ukrainio, Moldavio kaj Rumanio (pli ol 350 000 km$^2$), evoluis Kukutena-Tripilja kulturo (laŭ rumania vilaĝo Cucuteni kaj ukrainia vilaĝo Tripillja), kies paŝtistoj kaj agrokulturistoj sciis prilabori kupron, miksi fanditan kupron kun fandita stano kaj tiel fabriki bronzon.

Fine de bronza erao aperis iranaj triboj: kimeroj (2 000 a.K.), skitoj (en la 8-a jc a.K.) kaj sarmatoj (en la 3-a jc a.K.).

### Translokiĝo de nacioj

Inter la jaroj 350–375 en Ukrainio ekzistis Ostrogota ŝtato kun la reĝo Germanariĥ la 1-a. En Krimeo kaj marbordo de Nigra Maro estis fonditaj grekaj kaj gotaj kolonioj. En la 4-a kaj 5-a jc tie regis hunoj, sed post morto de Attila



Prelego dum kongreso en Domaszék

(†453) ilia unuiĝo disfalis. En la 5-a jc alvenis kutiguroj kaj utiguroj (parencoj de hunoj), en la 6-a jc avaroj. En centra kaj nordokcidenta Ukrainio setliĝis slavoj. En la 7-a jc antaŭbulgaroj en sudo kreis sian Grandan Bulgarion. Kiam ili migris okcidenten, la regionon ekmastris ĥazaroj, kiuj la landon protektis kontraŭ persianoj kaj araboj.

En la jaro 860 tien alvenis bizanciaj kristanaj misiistoj Konstanteno (Cirilo) kaj Metodo. Ili baptis ĥazarojn kaj trovis korporestaĵojn de Klemento la 1-a (la 4-a romkatolika papo, la martiro, al kiu ĉirkaŭ la jaro 100 liaj malamikoj pendigis ankron sur lian kolon kaj dronigis lin en Nigra Maro). Pro tio, en la jaro 863, ambaŭ sukcesaj kaj spertaj misiistoj estis senditaj en misian vojaĝon en Grandan Moravion (822–906).

### Kijiva Ruslando

En la jaro 482 oni fondis la urbon Kijivon.

En fino de la 9-a jc en partoj de teritorioj de nuntempaj Ukrainio, Ruslando kaj Belorusio ekestis Kijiva Ruslando, kiun unuigis novgoroda princo Oleg. Kijivo pagis tributon al Ĥazara Kaganato. Post la jaro 977 la kaganato malaperis.

En la jaro 988 (987–990) Vladimiro la 1-a la Granda, la plej signifa reganto de Kijiva Ruslando, estis baptita. Unue en Ĥersonesos (Krimeo) oni baptis la princon Vladimiron, poste en Kijivo okazis amasa bapto de loĝantoj en la rivero Dnipro. Nova kristano Vladimir ankaŭ ordonis "dronigi" statuon de nekristana dio Perun en la rivero kaj disrompi statuojn de aliaj slavaj dioj, kiujn li antaŭe ordonis instali en panteono.

En la 9-a kaj la 10-a jarcentoj Kijiva Ruslando fariĝis la plej granda kaj la plej potenca eŭropa ŝtato, kiu havis intensajn kontaktojn kun Pollando kaj Hungario. Anna Jaroslavovna Kijiva, filino de Jaroslav la 1-a la Saĝa, fariĝis edzino de franca reĝo Henriko la 1-a. La reĝino, kiu sciis legi kaj skribi, donis al la franca reĝo tri filojn. Kijiva Ruslando devis defendi sin kontraŭ atakoj de peĉenegoj kaj polovcoj.

En la jaro 1136 Novgoroda Princujo forlasis Kijivan Ruslandon.

## Mongolaj atakoj

En majo 1223 mongoloj venkis slavojn en batalo apud rivero Kalka. Post la batalo mongoloj retiriĝis, sed poste revenis. En la jaro 1240 ili konkeris Kijivon. Granda parto de nuntempa Ukrainio estis influita de mongola Ora Hordo.

Post disfalo de Kijiva Ruslando ekestis kelkaj sendependaj princujoj. En okcidenta parto la plej signifa estis Galicia-Volinja Princujo, kies la plej signifa reganto Danilo Romanoviĉ Halickij reĝiĝis. En centro ekzistis Kijiva Princujo, kiu estis la plej potenca dum regado de Jurij Dolgorukij, fondinto de Moskvo. En sudo loĝis nomadaj kipĉakoj.

Ekde fino de la 14-a jc okcidenta parto apartenis al Pollando. Granda parto de Ukrainio apartenis al Litova Grand-princujo. En sudo ekestis Krimea Ĥanato kaj orienton influis Moskva Ruslando.

Sur marbordo de Nigra Maro Ĝenova Respubliko kreis kelkajn koloniojn (ekzemple en Kilija).

## Krimea Ĥanato

En la jaro 1441 en Krimeo tatara ĥano Haĝi la 1-a Girej fondis dinastion, kiu tie regis ĝis la dua duono de la 18-a jc (1441–1783). Ekde la jaro 1478 Krimea Ĥanato estis turkia protektorato.

En la jaro 1482 krimeaj tataroj kon-keris kaj elbruligis Kijivon.

## Lublina Unio (1596)

En la jaro 1569 Pollando kaj Litovio kreis Lublinan Union (Pola-Litova Unio). Teritorio de Ukrainio, kiu antaŭe apar-tenis al Litovio (proksimume de la rivero Dnipro), ekapartenis al Pola Regno.

Ukrainia nobelaro akiris en Pollando la samajn rajtojn kiel la pola nobelaro, sed ĝi devis poliĝi kaj katolikiĝi. Escepto estis zaporoĵĵaj kozakoj, kiuj restis ortodoksaj. Zaporoĵĵe (loko malantaŭ riveraj "sojloj", kaskadoj) estis la teri-torio, kiu situis ĉirkaŭ 600 km sudoriente de Kijivo. La kozakoj loĝis en la teritorio kun centro en Siĉ, kie kuniĝis homoj el

diversaj socialaj tavoloj, precipe servutuloj, kiuj tie evitis feŭdalan subpremon. Ili kreis armean kvazaŭŝtaton. Poloj tion toleris, ĉar la kozakoj estis bravaj batalantoj, helpantoj en bataloj kontraŭ turkoj kaj tataroj. En pollanda-litovia armeo ili akiris aŭtonomion (t.n. registritaj kozakoj). Zaporoĵjanoj kreis armean bufran zonon en Sovaĝaj Kampoj, kies najbaro estis Krimea Ĥanato.

Preskaŭ ĉiujare krimeaj tataroj kaj nogajoj (omaĝuloj de turkoj) atakadis sudan kaj orientan Ukrainion, tiel estis danĝere tie loĝi. Oni taksas, ke inter la 15-a kaj la 18-a jarcentoj krimeaj tataroj kaptis kaj al turkiaj sklavistoj vendis eĉ tri milionojn da homoj.

## Brestlitova Unio (1596)

Pola nobelaro la kozakojn deziluziis, precipe kaŭze de subpremo de kamparanoj kaj malbona rilato al ortodoksa religio. Sed en la jaro 1596 katolikoj kaj kelkaj ortodoksanoj faris kontrakton (Brestlitova Unio) kaj kreis Ukrainian Grek-Katolikan Eklezion, kiu estas la dua plej granda eklezio en Ukrainio.

## Popolleviĝo de Ĥmelnickij (1648)

En la jaro 1648 en Ukrainio okazis granda kozaka popolleviĝo. La kozakoj sub la gvido de Bohdan Ĥmelnickij kune kun krimeaj tataroj kelkfoje venkis polojn. En la sudo de nuntempa Ukrainio ekestis Kozaka Hetmanato, kozaka kvazaŭŝtato, kun 3 milionoj da loĝantoj.

Dum la popolleviĝo tre suferis la judoj. En Pollando, Litovio kaj Blankrusio la kozakoj mortigis preskaŭ 100 milojn da judoj. La kozakoj mortigis ankaŭ polojn, precipe polajn nobelojn. Ili estis tre kruelaj, ĉar ili siajn viktimojn brulmortigis aŭ palisumis. Pri la masakroj persone respondis Ĥmelnickij kaj liaj kozakestroj. Multe da judoj ekziliĝis, eĉ en Moravion kaj Bohemion.

## Kontrakto de Perejaslav (1654)

En la jaro 1651 poloj venkis kozakojn apud Beresteĉko. Ĥmelnickij sciis, ke liaj kazakoj ne kapablas venki polojn, tial en la jaro 1654 li petis ruslandan caron Aleksej la 1-a pri helpo. La caro helpon promesis, sed volis kun la kozakoj fari kontrakton. Kompreneble, nur tian kontrakton, kiu estu profitutila por Ruslando. Kaŭze de Kontrakto de Perejaslav (1654) unuiĝis parto de Ukrainio, kiu situis en maldekstra bordo de la rivero Dnipro, kun Ruslando. Ĥmelnickij perdis sian konfidon al rusoj, tial li provis krei union kun Transilvanio kaj Svedio, sed ne sukcesis.

Post morto de Ĥmelnickij provis gvidi kozakojn lia juna filo, sed en 1662 li rezignis. Nova kozakestro Ivan Vihovskij ne plu volis kunlabori kun rusoj. Li volis fari kontrakton kun poloj, por ke Ukrainio estu la tria regato de Pola-Litova Unio.

## Kontrakto de Hadjaĉ (1658)

Pola-Litova Unio faris kun kozakoj la kontrakton, kiu en 1658 estis subskribita en Hadjaĉ kaj en 1659 pola-litovia deputitaro ĝin aprobis. Laŭ la kontrakto nova Unio havus tri membrojn: Polan Regnon, Litovian Grandprincujon kaj Hetmanan Ruslandon. Kozakoj havus la samajn rajtojn kiel poloj kaj litovoj (proprajn oficojn, armeon, juĝon) kaj

povus resti ortodoksanoj. Sed kaŭze de milito en Pollando, malkonsento de kozakoj kaj ribelo kontraŭ Vihovskij la nova Unio neniam ekestis.

## Ruino

Anstataŭ nova trimembra unio en la jaroj 1657–1686 alvenis epoko nomata "ruino". Tio estis la epoko de ĥaoso, disfalo kaj milito inter Ruslando, Pollando, Krimea Ĥanato, Turkio kaj kozakoj. La kozakoj estis venkitaj kaj ilia teritorio estis dividita inter Ruslando kaj Pollando. Limo estis la rivero Dnipro.

La 30-an de januaro 1667 en la vilaĝo Andrusovo rusoj kaj poloj paciĝis.

## Kozaka hetmano Ivan Mazepa

En ruslanda parto kozakojn ekgvidis la hetmano Ivan Mazepa. Komence li kredis, ke caro Pjotr la 1-a donos al Ukrainio aŭtonomion. Kiam li eksciis, ke la caro tion ne faros, li en Norda Milito batalis kun svedoj kontraŭ Ruslando, sed en la jaro 1708 li estis venkita kaj en la jaro 1709 rusoj venkis svedojn apud Poltava.

En la jaro 1768 en Pollando okazis la plej granda ukraina popolleviĝo. Dum la divido de Pollando en la jaro 1772 Ruslando akiris ankaŭ plimulton de dekstra parto Ruslando (krome Galicio kaj Bukovino, kiuj ekapartenis al Aŭstrio-Hungario). En la jaro 1775 Zaporoĵja Siĉ malaperis.

En fino de la 18-a jc turkoj kaj tataroj en sudo de la lando estis venkitaj. En nove konkerita lando (tiel nomata Nova Ruslando) carino Katerina la 2-a la Granda kaj ŝia konsilanto princo Potjomkin fondis la urbojn Odesa, Jekaterinoslav, Sevastopol k.a. La carino invitis multe da eksterlandanoj: germanojn, bulgarojn, sorabojn kaj grekojn.

## Ukrainio en la 19-a jarcento

La 19-a jc estis erao de nacia subpremo, sed ankaŭ la erao de nacia reviviĝo, kiam kreiĝis ukrainia nacio. En la jaro 1846 estis fondita Kyrilometodea Kompanio, kies membro estis ukrainia poeto Taras Hrihoroviĉ Ŝevĉenko.

En sudo de Ukrainio okazis granda konflikto, Krimea milito (1853–1856) en kiu partoprenis Ruslando, Turkio, Francio, Grandbritio kaj Piemonto. Ruslando la militon komencis kaj estis venkita. Ruslandaj soldatoj kaj maristoj defendis krimean havenon Sevastopolon dum 11 monatoj.

Nova ondo de nacia reviviĝo, kies reprezentanto estis ekzemple Miĥajlo Petroviĉ Drahomanov, alvenis en la 70-aj jaroj. Inter poetoj aperis talentita ukrainia poetino Lesja Ukrainka (propranome Larisa Petrivna Kosaĉ-Kvitka).

El Perejaslav devenis hebrea verkisto Ŝolom Alejĥem (propranome Rabinoviĉ), kiu verkis en jido. Li ekziliĝis en Usonon. En la jaro 1964 oni prezentis la muzikalon "Violonisto sur la Tegmento" (laŭ libro de Ŝolom Alejĥem *Tovje la Lakto-vendisto*) en Broadway.

Inter la jaroj 1881–1891 pentristo Ilja Jefimoviĉ Repin kreis la bildon "Zaporoĵjaj Kozakoj Skribas Leteron al Turkia Sultano". La bildo temas pri historia evento en 1676. Tiam la sultano Mehmed la 4-a sendis al kozakoj sian leteron, en kiu li al ili ordonis kapitulacion. La kozakoj respondas al la sultano

tre senrespekte kaj mokas lin. Ili ne timas turkojn. Al Ukrainio neniu devas dikti siajn postulojn – nek sultano nek rusoj!

Ruslanda caro Aleksandro la 2-a ukrainian nacian reviviĝon ne toleris. En la jaro 1876 li en germana urbeto Bad Ems eldonis Dekreton de Ems, kiu malpermesis publikan uzadon de ukraina lingvo. Lia filo Aleksandro la 3-a la dekreton iom plimalfortigis. Ĝenerale dirite: ruslandaj caroj neniam volis, ke ukrainoj havu sendependencon, propran lingvon kaj kulturon.

En parto de la lando, kiu apartenis al Aŭstro-Hungario estis pli tolerema reĝimo. Jam en la 19-a jc tie krome ukrainoj kreis rutena nacio kun propranatura lingvo kaj kulturo. En la jaro 1890 tie oni fondis Ukrainian Radikalan Partion. Frataro de Tarasovoj estis la unua politika organizo, kiu volis liberigi Ukrainion de ruslanda superregado.

## La 20-a jarcento

En la jaro 1900 en Ĥarkiv oni fondis Revolucian Ukrainian Partion.

Antaŭ fino de la unua modmilito kaj dum civitana milito en Ruslando oni en parto de ukrainia teritorio kreis kelkajn ukrainiajn registarojn.

Inter 1917–1919 en orienta parto de Ukrainio ekzistis Ukrainia Popola Respubliko, sed ruslandaj bolŝevikoj ĝin neniigis.

En la jaroj 1918–1919 ekzistis Okcidentukrainia Popola Respubliko, kiu uzis blazonon kun tridento. Por mallonga tempo ĝi unuiĝis kun orienta Ukrainia Popola Respubliko (januaro 1919), sed baldaŭ poloj kaj rumanoj ĝin neniigis.

La unua ukrainia prezidento estis historiisto, literaturisto kaj filozofo Miĥajlo Serhijoviĉ Hruŝevskij. Jam en februaro 1919 bolŝevikoj konkeris Kijivon kaj ambaŭ partoj de Ukrainio devis batali en siaj propraj militoj: okcidenta parto kontraŭ poloj kaj orienta parto kontraŭ rusoj.

La okcidenta parto ekapartenis al Pollanda Respubliko kaj Transkarpata Ukrainio al Ĉeĥoslovakio. En la jaro 1922 bolŝevikoj kreis Ukrainian Sovetan Socialisman Respublikon (USSR) kun ĉefurbo Ĥarkiv. Ekde la jaro 1934 la ĉefurbo de USSR estis Kijiv.

En 1929 en Vieno ukrainaj elmigrintoj fondis Organizon de Ukrainiaj Nacionalistoj (OUN), kies celo estis kreado de sendependa ukrainia ŝtato. Unu frakcion de OUN gvidis Stepan Andrijoviĉ Bandera. (En Ĉeĥoslovakio jam ekde la jaro 1929 OUN estis malpermesita.)

Komence Sovetunio naciajn lingvojn kaj kulturojn de nerusaj nacioj subtenis, sed poste sovetoj la nerusajn naciojn rusigis. En 1938 en ĉiuj nerusaj lernejoj rusa lingvo fariĝis deviga disciplino. Naciaj politikistoj estis nomataj "burĝaj nacionalistoj" kaj persekutataj.

## Malsategoj en Ukrainio

En la jaroj 1932–1933 kaŭze de brutala kolektivizado de agrokulturo en Ukrainio okazis malsatego [ukr: *holodomor*]. Tiam kaŭze de malsato mortis 5 milionoj da loĝantoj de USSR, norda Kazaĥstano kaj suda Ruslando (Kubanj). Pli malgrandaj malsategoj okazis inter la jaroj 1921–1923 kaj 1946–1947 (post la militoj).

## La dua mondmilito

En la jaroj 1941–1944 germanoj okupadis Ukrainion. Kelkaj ukrainoj pri tio ĝojis, ĉar al ili ne plaĉis politiko de Stalin. Sed germanoj havis sian propran programon. Ili volis Ukrainion ekspluati, deportis du milionojn da ukrainoj por laboroj en Germanio kaj volis la landon prepari por germana kolonizado.

La 30-an de junio 1941 Stepan Bandera en Lviv proklamis sendependecon de Ukrainio. Post kelkaj tagoj germanaj nazioj ukrainian registaron dispelis kaj en Berlino ukrainiajn politikistojn devigis la proklamon revoki. Ukrainoj tion ne volis fari, tial ili estis malliberigitaj en koncentrejoj, ekzemple Bandera en Sachsenhausen (1941–1945).

La 14-an de oktobro 1942 en okcidenta Ukrainio ekestis Ukrainia Popolleviĝa Armeo (UPA). Tio estis armita flanko de OUN. Celo de UPA estis sendependa ukrainia ŝtato en la teritorio kun etna ukraina plimulto. Tiuj batalantoj neniam uzis la nomon "banderanoj". Ekde la jaro 1943 ĝis fino de la dua mondmilito UPA masakris polojn en Volinj kaj orienta Galicio. UPA mortigis ĉirkaŭ 100 000 da polaj civiluloj. Sed ankaŭ poloj masakris ukrainojn. Post la milito ĝis la 50-aj jaroj UPA daŭre batalis kontraŭ Sovetunio.

Nek UPA nek OUN rekte kunlaboris kun germanaj nazioj, escepte de flanko de Andrij Melnik. Sed alia nacia movado, Ukrainia Liberiga Armeo (ULA), batalis kune kun la nazioj. Sed plimulto da ukrainoj batalis en soveta Ruĝa Armeo (4,5 milionoj da ukrainoj) kaj soveta kontraŭnazia rezisto.

En Ukrainio germanoj mortigis judojn. Germanaj trupoj *Einsatzgruppen*, iam kun helpo de lokaj kunlaborantoj, mortigis ĉirkaŭ 1,5 milionoj da judoj.

El taksitaj 8,6 milionoj da perditaj sovetaj soldatoj 1,4 milionoj estis ukrainoj. Dum la milito pli ol 700 ukrainiaj urboj kaj 28 000 da vilaĝoj estis neniigitaj. Ukrainio estis detruita.

## Lastaj bataloj de UPA

Je la fino de la milito membroj de UPA volis fuĝi okcidenten kaj kapitulaci al usonanoj. En Pollando UPA estis neniigita dum Agado Visla, dum kiu multe da ukrainoj estis deportitaj en nordan Pollandon. En Ĉeĥoslovakio UPA ŝanĝis sian taktikon kaj ne teroris civitanojn. UPA-anoj eĉ skribis leteron al prezidento Edvard Beneš, ke ili alvenas kiel gastoj kaj volas nur trapasi ĉeĥoslovakian teritorion. Rotoj de Burlak kaj Hromenko aperis en Slovakio, kie kontraŭ ili batalis armeo kaj polico. Burlak estis malliberigita kaj en Pollando ekzekutita. Lia roto estis neniigita. La Roto de Hromenko atingis Germanion. Hromenko ne restis en sekureco. Li kontinuis sian batalon por libera kaj sendependa Ukrainio, fariĝis kuriero kaj en la jaro 1950 li falis.

## Neniigo de grekkatolika eklezio

Bataloj kontraŭ UPA estis por komunistoj bona kialo por neniigo de grekkatolika eklezio, kiu estis akuzita de subteno de UPA. En okcidenta Ukrainio tio okazis la 10-an de marto 1946, en Rumanio la 1-an de decembro 1948 kaj en Transkarpata Ukrainio la 28-an de aŭgusto 1949. La 8-an de decembro 1950 ekestis Ĉeĥoslovaka Ortodoksa Eklezio kun praga

metropolito eksarko Jelevferij, propranome Voroncov. Bona novaĵo estas, ke la 28-an de majo 2022 Ukrainia Ortodoksa Eklezio liberiĝis de moskva patriarkeco. (Nuntempa ruslanda ortodoksa patriarko Kirill, propranome Gundjajev, estas ne nur amiko de Putin, sed ankaŭ longtempa kunlaboranto de KGB).

## Stalina teroro

Postmilita stalina reĝimo deportis loĝantojn de Ukrainio en aliajn lokojn de Sovetunio. En januaro 1953 ukrainoj estis 20 % da ĉiuj deportitaj personoj en Sovetunio. Krom tio sovetoj deportis pli ol 450 000 da germanoj kaj 200 000 da krimeaj tataroj.

Al Ukrainio sovetoj aligis ĝian nuntempan okcidentan parton (okcidentan Volinjon kaj orientan Galicion). Jam en septembro 1939 sovetoj tiun parton okupadis. Vintre (1939/1940) ili aranĝis referendumojn kun falsado de rezultoj. La falsitaj referendumoj klare montris, ke loĝantoj "volas" aligi siajn regionojn al Sovetunio. En la jaro 1945 simile laŭ falsitaj rezultoj de referendumo sovetoj aligis al USSR ankaŭ Transkarpatan Ukrainon, kiu antaŭ la milito apartenis al Ĉeĥoslovakio.

## Post morto de Stalin

Soveta reĝimo de Ĥruŝĉov ne forgesis pri Bandera kaj lin mortigis. La 15-an de oktobro 1959 Bohdan Staŝinskij, soveta agento de NKVD, en Berlino Banderon venenigis uzante cianidon.

En la jaro 1954 okaze de soleno de la 300-a datreveno de Kontrakto de Perejaslav (1654) Nikita Ĥruŝĉov donis al Ukranio Krimeon. Tie loĝis precipe ukrainoj, sed post ruslanda-turkia milito (1782–1784) tiu ĉi duoninsulo ekapartenis al Ruslando.

USSR industriiĝis. En la 60-aj jaroj kontinuis la industrialigado precipe en orienta parto de la lando. Sur rivero Dnipro estis konstruitaj digolagoj.

La 26-an de aprilo 1986 okazis averio de atomenergia centralo apud Ĉernobil.

## Sendependa Ukrainio

En la jaro 1990 ukrainia parlamento proklamis suverenecon de Ukrainio. La 24-an de aŭgusto 1991 oni proklamis sendependecon. En referendumo 90,3 % da balotantoj la sendependecon de Ukrainio subtenis.

Simbolo de Ukrainio estas Tridento. Kion tiu ĉi simbolo signifas?

**Plonĝe fluganta falko (*Falco peregrinus*) – slava simbolo, kiu fariĝis simbolo (blazono) de Ukrainio.**



Bedaŭrinde transiro de socialisma ekonomio al merkata ekonomio, dum kiu mankis efika kontrolo de entreprenoj, kaj precipe malkapableco de politikistoj fari verajn reformojn, gvidis al ekonomia malsukceso. Nur ĉirkaŭ la jaro 2000 la situacio pliboniĝis.

Ukrainaj politikistoj longtempe hezitis inter orienta kaj okcidenta politikaj

blokoj. Ili perdis multe da tempo kaj Ukrainio eniris nek en Eŭropan Union nek en NATO-n. Tio estis granda eraro. Sonĝo pri "ponto inter okcidento kaj oriento" ne estas reala. Oni ne povas resti neŭtrala ŝtato, kiu ruze uzas avantaĝojn de ambaŭ sistemoj.

La unua prezidento estis Leonid Makaroviĉ Kravĉuk (1934–2022), kiu forpasis en majo 2022. En la jaro 1994 Leonid Kuĉma fariĝis prezidento.

En la fino de la jaro 2004 okazis nearmita Oranĝkolora Revolucio. Viktor Janukoviĉ, kiu helpas al Moskvo, estis akuzita pri balotada trompo. Ripetitan balotadon venkis Viktor Juŝĉenko.

En la jaro 2010 venkis Viktor Janukoviĉ (48 % da voĉoj). Li subskribis Ĥarkivan Kontrakton, kiu permesis al rusoj lasi militŝipojn en krimea haveno Sevastopol. Manifestacioj de ukrainoj (ekde la 22-an de novembro 2013, Eŭromajdan) subtenis postulon pri eniro de Ukrainio en Eŭropan Union. La 1-an de marto 2014 Janukoviĉ sendis al putin (malgranda litero ne estas tajperaro) leteron, en kiu li petis pri renovigo de ordo en Ukrainio per ruslanda polico kaj armeo. La 22-an de februaro 2014 Janukoviĉ fuĝis el Ukrainio en Ruslandon.

## Milito en la jaro 2022

Ĝisviva ruslanda diktatoro putin (origine huligano en stratoj de Leningrad, poste spiono en Germanio kaj kolonelo de KGB) jam ekde disfalo de Sovetunio (1991) revas pri renovigo de granda ruslanda ŝtato. Minimume ekde la jaro 2000 li preparis konkeron de Ukrainio. Al tiu celo servas hibrida milito, mensogoj, sendoj de specialaj armeaj taĉmentoj (maskitaj en nemarkitaj uniformoj kaj subtenitaj per "konvojo kun helpo al civiluloj"), kontraŭukrainia propagando. La 22-an de februaro 2022 Ruslando agnoskis "Luhanskan kaj Doneckan Respublikojn" kaj la 24-an de februaro 2022 ruslanda armeo atakis Ukrainion.

Multe da civitanoj de Ruslando opinias, ke tio estas bona ago de ilia diktatoro. Mi ne miras, ĉar ili estas ekde naskiĝo influitaj de propagando. Diktaturo de putin estas alia ol diktaturoj de stalin kaj hitler, ĉar ĝi kapablas garancii al loĝantoj konzumadon. Nuntempa ruslanda reĝimo ne timas represiojn, sed venenigas animojn de homoj. (Same en la jaro 1980 multe da homoj en Ĉeĥoslovakio ne sciis kaj ne volis scii pri Agado Karkonoŝe, kiam ĉeĥoslovaka socialisma reĝimo sendis du diviziojn kontraŭ pola Solidareco.)

Eŭropa Unio kaj Usono al Ukraino helpas, sed ne ĉiuj politikistoj havas la samajn opiniojn. Iuj timas pri ruslanda gaso, kruda oleo kaj karbo, aliaj reprezentas entreprenistojn, kiuj havas en Ruslando ekonomajn interesojn.

En Ĉeĥio troviĝas pli ol 400 000 fuĝintoj (fine de aŭgusto laŭ UN /red).

Efika helpo al ukrainiaj defendantoj kaj fuĝintoj ne estas nur belaj vortoj. Tial mi ekde komenco de la milito (februaro 2022) regule, ĉiumonate, sendas monon al Ukrainia Ambasado: Vi ankaŭ helpu ilin!

*Ukrainio venkos.*
*Gloro al Ukrainio!*
*Gloro al herooj!*

# La morto de Peregrino

## Lukiano al Kronio: bondezire! – parto dua

Gerrit BERVELING, NL

Daŭrigo de antaŭa numero

17 "Tial triafoje li foriris, al Egiptujo, por viziti Agatabulon[8], kie li sekvis mirindan kurson pri trejnado en asketismo, razante duonon de la kapo, plastrokovrante la vizaĝon per koto, kaj demonstrante kion oni nomas 'seninteresiĝo', erektigante sian penison meze de popolamaso[9]

18 "De tie, tiel prepariĝinte, li ŝipveturis al Italujo, kaj tuj post elŝipiĝo ĉiujn li ekinsultis, kaj precipe la Imperiestron[10], ĉar tiun li konis kiel mildan kaj afablan, do li sin sentis ekster danĝero per sia atako. La Imperiestro, kiel eblis antaŭvidi, malmulte okupiĝis pri liaj skribaĵoj kaj ne opiniis necesa puni pro nuraj vortoj iun viron, kiu filozofion uzis kiel mantelon, kaj precipe viron, kiu faris el insultado sian profesion. Sed koncerne nian amikon, eĉ pro ĉi tio kreskis lia reputacio, minimume inter simpluloj, ĝis fine la urba prefekto, saĝa viro, sendis lin for pro troa toleremo en tio, dirante ke la urbo ne bezonas tian filozofon. Tamen ankaŭ tio helpis al lia famo, kaj ĉie oni parolis pri li kiel la filozofo kiu estis elpelita pro sia parollibereco kaj troa senlimeco, tiel ke tiurespekte li alproksimiĝis al Musonio[11], Diono, Epikteto kaj ĉiu ajn alia en tiu kategorio.

19 "Fine veninte en Greklandon en ĉi situacio, je certa momento li insultis la loĝantojn de Eleo, alian fojon li proponis al la Grekoj ekbatali kontraŭ la Romianoj, kaj alian fojon iun li titolis mirinda en literatura agado kaj pozicio, ĉar li estis bonfaranto por Greklando en multaj aferoj, kaj precipe, ĉar akvon li kondukis al Olimpio[12] kaj preventis, ke la spektantoj de la festivalo mortu pro soifo, asertante ke la Grekojn li faras inecaj, ĉar la spektantoj de la Olimpiaj Ludoj devas elteni sian soifon – jes, je Ĉielo! Ili eĉ risku la vivon senhezite, multaj el ili, per la oftaj malsanoj kiuj antaŭe disvastiĝis en la egaj amasoj pro la sekeco de tiu loko! Kaj tion li diris, samtempe mem trinkante akvon!

"Kiam ili lin preskaŭ mortigis per ŝtonoj, interpuŝante grandamase, lastmomente li eskapis fuĝante al Zeŭso por ŝirmloko (ho kuraĝulo!), **20** kaj poste, ĉe la sekvaj Olimpiaj Ludoj al la Grekoj li prezentis oratoraĵon, kiun li preparis en la kvar jaroj kiuj intere pasis, laŭdante sin mem pro la tiumomenta forkurado.

"Fine lin neglektis ĉiuj kaj ne plu same admiris – ĉar ĉio perdis la forton kaj nenion freŝan eblis ankoraŭ elpremi por surprizi la pasantojn, por ke mirplene ili rigardu al li –, afero, kiun dekomence li ja tiom sopiregis. Tiel do fine li prenis la riskon de la brulŝtiparo, kaj disvastigis inter la Grekoj la famon, ke tuj post la fino de la Olimpiaj Ludoj li sin bruligos.

**21** Kaj nun onidire li ludas la ĉarlatanon ĉi-rilate, fosante truon, kunigante ŝtipojn, kaj promesante vere mirindan forton[13].

"Kion li devus fari, laŭ mi, estas unue kaj precipe atendi sian morton kaj ne forkuri de la vivo; sed kion fari li decidis, estis je ĉiu kosto formalaperi, ne uzi fajron aŭ alian de la elpensaĵoj de la tragedio, sed por sia malapero elekti alian el la sennombraj metodoj por morti kiuj ekzistas. Se tamen li estas partiema por fajro kiel io ligita al Heraklo, kiel li do ne elektis bone arboriĉan monton por kremacii sin sur ĝi tute sola, kunportante kun si nur unu personon kiel ekzemple Teageno kiel sian Filokteton[14]? Tute male, ĝuste en Olimpio, ja la apogeo de la Festivalo, preskaŭ meze en teatro, li planas rosti sin – ne senmerite, je Heraklo, se estas prave por sinmortintoj kaj ateistoj suferi pro sia dureco[15]. Kaj de tiu vidpunkto efektive li jam estis tre malfrue; li devus esti metita en la bovon de Falariso[16] por pagi taŭgan punon anstataŭ malfermi sian buŝon al la flamoj kaj en ekpenso malekzisti. Ĉar onidire neniu alia morto pli rapidas ol tiu per fajro; oni malfermu nur la buŝon – kaj jen mortinte!

22 "La spektaklo estis planita – mi supozas – kiel io impona – viro bruligata en sankta loko, kie eĉ estas malpie entombigi mortintojn. Sed sendube vi aŭdis, ke antaŭ longe iu viro kiu deziris famiĝi forbrulis la templon de Artemisa de Efezo, nekapabla alimaniere atingi sian celon[17]. Li mem havis iom similan planon; tiel granda estis la deziro pri famo, kiu lin trapenetris.

23 "Tamen li asertis, ke tion li faras pro siaj kunhomoj, ke li instruu al ili malŝati la morton kaj elteni la timindan. Miaflanke mi ŝatus demandi, ne al li sed al vi, ĉu vi dezirus ke malbonfarantoj fariĝu liaj disĉiploj en tiu lia forto, kaj malŝatu la morton kaj bruligon kaj similajn teruraĵojn. Ne, mi certas ke tion vi ne volas. Sed kiel do Proteo faru distingojn en ĉi afero? kiel li do bonfaru sen fari la malbonulojn pli kuraĝaj kaj pli entreprenemaj?

24 "Tamen, supozu, ke nur tiuj sin prezentas, kiuj vidas ian gajnon. Denove mi demandas: ĉu vi dezirus ke viaj infanoj imitos tian viron? Vi neos tion. Sed kial tion mi demandis, se eĉ ne unu el liaj disĉiploj imitas lin? Efektive, la afero, pro kiu pleje oni povus kulpigi Teagenon, estas, ke kvankam la viron li imitas en ĉio cetera, sian instruiston li ne sekvas nun, kiam, kiel li diras, li estas for por kuniĝi kun Heraklo; ho, la eblon ja li havas atingi absolutan feliĉon tuj saltante kapantaŭen en la fajron kun li!

"Rivaleco ne estas afero de monujo, bastono aŭ mantelo; ĉio ĉi estas senriska kaj facila kaj atingebla de ĉiu. Oni rivalu pri kulmino, konstruu brulŝtiparon el blokoj de figligno kiel eble plej freŝa, kaj sufoku sin mem en ties fumo. Fajro en si mem ne apartenas al Heraklo kaj Asklepio, sed ja la pordoj de sakrilegio kaj murdo, kiuj estas videblaj dum oni suferas pri juĝeja verdikto. Tiel prefere uzeblu fumo, kiu nur apartenas al vi mem kaj viaj similuloj.

25 "Krome, se Heraklo vere realigis ion similan, li tion certe nur

faris, ĉar li estis malsana, ĉar la sango de la Centaŭro, kiel rakontas la tragedio, forronĝis lin; sed pro kiu kaŭzo tiu ĉi ulo ĵetus sin en la brulŝtiparon? Ho jes! Por montri sian fortecon, kiel la Braĥmanoj, ĉar Teageno kredas inde kompari lin kun ili, kvazaŭ ne ekzistus stultuloj aŭ famserĉantoj eĉ inter la homoj en Indio. Nu, do, minimume li tiujn imitu. Ili ne saltis en fajron (tiel diras Onesikrito, la navigisto de Aleksandro, kiu vidis bruli Kalanon), sed kiam ili starigis sian brulŝtiparon, ili staris flanke de ĝi senemocie kaj duonrostitaj; poste, suprengrimpinte ili sin bruligas sen iu ŝanĝo en la pozicio, kiel ili kuŝas.

"Ĉi-okaze kiu problemo estus, se li simple ensaltus kaj subite forbrulus en la fajro? Ja eblus, ke duonbrulinte subite li saltus ekster la flamoj, krom, se kiel oni diras, li bone atentus, ke la brulŝtiparo estu tre profunde en la fosaĵo. **26** Ekzistas homoj, kiuj diras, ke li eĉ ŝanĝis sian intencon, kaj rakontas certajn sonĝojn, tiel ekzemple, ke Zeŭso ne permesas malpurigi sanktan lokon[18]. Sed pri tio li ne zorgu; mi pretus ĵuri pri tio, ke neniu el la Dioj povus koleri, se Peregrino mortus la morton de fiulo. Por li eĉ ne estus simple malaperi nun; ĉar liaj Cinikaj kamaradoj urĝis lin kaj insistis al la brulŝtiparo kaj flamigis lian certecon; ili ne lasus lin retiriĝi. Se kelkajn el ili li kuntirus kun si en la flamojn, kiam li ensaltus, tio nur estus bela aldono al la prezentaĵo.

27 "Mi aŭdis, ke li ne plu volis esti nomata Proteo, sed ŝanĝis sian nomon en Fenikso, ĉar la fenikso, la India birdo, laŭdire suriĝas brulŝtiparon, kiam li estas tre grandaĝa. Li eĉ ja adaptis mitojn kaj certajn orakolojn, malnovajn kompreneble, kun la intenco fariĝi gardanta spirito de la nokto; estas klare, ke altarojn li deziris kaj atendis esti bildigita en oro.

28 "Kaj je Zeŭso, estus neniel kontraŭnature se, inter ĉiuj stultuloj kiuj ekzistas, kelkaj estus troveblaj, kiuj asertas, ke ili resaniĝis dank' al li de terciana febro, kaj ke en la mallumo ili renkontis la gardospiriton de la nokto! Tiam ankaŭ certaj liaj disĉiploj iniciatos orakolan sanktejon, mi supozas, kun iu plej sankta sanktĵo, ĉe la loko de la brulŝtiparo, ĉar la famega Proteo, filo de Zeŭso, la unua de tiu nomo, estis transdonita al aŭgurado. Mi donas mian vorton, ke pri li estos starigitaj pastroj, kun vipoj aŭ kaŭteriziloj aŭ iaspeca miraklofarado, aŭ eĉ kun loka nokta misterokulto je lia honoro, inkluzive torĉfestivalon sur la loko de lia sinbruligo.

29 "Antaŭnelonge, kiel unu el miaj amikoj rakontis, Teageno diris, ke la Sibila pri ĉio ĉi faris antaŭdiron; kaj fakte el memoro li jene citis:

*Sed venos temp', ke Proteo, plej nobla el ĉiuj Cinikaj,*
*fajron bruligos sur lok' de Zeŭso, nia Tondranto,*
*saltos en flamojn, atingos altegan Olimpon,*
*tiam do ĉiujn honori mi petas, ter-fruktojn manĝante,*
*doni honoron al li promenanta nokte ekstere,*
*ega spirit' kun Hefajst' kaj Heraklo reganta.*

30 "Tion do laŭdire Teageno aŭdis de la Sibila. Sed mi mem citos orakolaĵon al li, kiun Bakiso samteme eldiris[19]. Li eĉ aldonis brilan moralon:

*Venos la temp', ke Cinika multnoma saltos en fajron,*
*kiun strebado al glor' senindulga pasie plupelos,*
*tiam imitos lin la ceteraj, kiuj tuj sekvos,*
*sed se poltron' tiumeze eskapas de Hefajsto,*
*tiu draŝita estu tuj de ĉiuj Aĥajoj,*
*ke li, stultulo, tuj forĵuru ĉiujn arogojn,*
*sian monujon per oro ŝtelita troe ŝarĝante;*
*kvin trifoje talantojn li ŝuldas en urbo Patrasa.*

Kion ni do pensu, sinjoroj? Ĉu Bakiso estas malpli bona profeto ol Sibila? Estas do fine la tempo por tiuj mirindaj sekvantoj de Proteo ĉirkaŭrigardi pri loko por aerumi sin mem – ĉar tio laŭ ili estas kreado[20].

Daŭrigota

——— Piednotoj

8. Ĉi instruisto de Peregrino estis fame konata.
9. Kelkaj ekzemploj el tio, kion Diogeno konsideris kiel 'indiferentan', krome bastone donante aŭ ricevante batojn sur la dorso kiel vera ĉarlatano.
10. Antonino Pio.
11. Stoika filozofo, tempo de Nerono forpelita el Romo; dum imperiestro Galbo li revenis, poste ree ekzilita.
12. La fama Herodoto Atiko konstruigis akvedukton ĉe Olimpio; Proteo ofte intertraktis tiuteme kun li
13. Lukiano en tiu ĉi verko parolas pri 4 malsamaj Olimpiaj Ludoj; certa Paul Graindor laŭ piednoto en la Loeb-eldono, kiun mi uzas, jene kalkulas: la unuaj estas tiuj dum kiu Peregrino kritikis la akva-dukton, ĉe ĝia finkonstruado p.Kr. 153; ĉe la sekvaj p.Kr. 157 sian kritikon li retiris. La Olimpiaj Ludoj de p.Kr. 161 nomiĝas ĉi tie 'la lastaj'. La sekvaj , dum kiuj okazos la sinbruligo de Perigrino, certe postulos iom da tempo – jen p.Kr. 165.
14. Filokteto helpis Heraklon kremacii sin mem sur monto Ojto fajrigante por li la brulŝtiparon.
15. Ĉar efektive la kremacio okazis en Harpino, du mejlojn for de Olimpio, la tagon post kiam fermiĝis la festivalo, eble pro religiaj konsideroj [vidu ĉapitron 26] Peregrino ŝanĝis la originan planon okazigi ĝin en Olimpio mem dum la festivalo.
16. Tirano de Akragaso sur Sicilio, kiu laŭdire restis siajn kontraŭulojn en la ventro de varmigata statuo.
17. Herostrato, en 356 a.Kr. La Efezanoj klopodis nuligi lian intencon per malpermeso iam ajn mencii lian nomon. Tiu malpermeso, probable kune kun malbeno okaze de malobeo, estis relative sukcesa, ĉar preskaŭ ĉiuj klasikaj aŭtoroj, kiuj tion ĉi rakontas, inkluzive Ciceronon kaj Plutarĥon, ne mencias la nomon, same kiel Lukiano.
18. Vidu 20, ke Peregrino ŝajne elektis alian daton por la sinbruligo.
19. Bakiso estas titolo, ne nomo, iom komparebla kiel Sibila. La nomo ofte estis uzata por ŝerci pri trompaĵoj, ekzemple ĉe Aristofano.
20. Vi vidos en ĉapitro 33 (sekvonta DR /red).

(Red: ĉapitroj 20, 21 kaj 26 intense estas aliaj, ĉar estas parto de la antaŭa frazo.)

Kontraŭ peko batalu, sed pekanton ne tuŝu!.

*Zamenhof*

# Informetoj

## Bibliaj Tagoj 2023

2023-03-08–12 en la Romia urbo Trevero (Trier)

Ni volas, kiel dum la pasintaj jaroj, komune diskuti pri parto el la Biblio, nun pri la 2 Leteroj de Petro. Krom la diskutoj, prelegoj, komuna preĝado okazos ekskursoj.

Por la komunaj preĝado kaj kantado ni uzos la libron *Adoru*.

Wolfram Rohloff preparas la kadran temon: *La 2 leteroj de Petro*.

Ĵaŭde ĝis sabate Ulrich Matthias gvidos posttagmezan ekskursan programon en Trier kaj ĉirkaŭo.

Kantoro Stefan Lepping kun ni muzikumos.

Pli da informo baldau ĉe: *www.esperanto.de/keli*

---

72-a Kristana Kongreso de KELI
5–12 de aŭgusto 2023
Bjalistoko – Pollando

## Kongreso 2023

Karaj gefratoj, la organizantoj kore invitas vin partopreni la Kristanan Kongreson en la naskiĝurbo de nia Majstro – Ludoviko Zamenhof.

Bjalistoko situas 200 km for oriente de Varsovio, proksime al la landlimo kun Belorusio. La Kongreso okazos en la Porpastra Seminario situanta en la urbocentro. Ĉio sub unu tegmento. Ni planas montri al vi multreligiecon kaj multkulturecon de la regiono Podlaĥio, ankaŭ dum la kongreskunsidoj ekster la urbo, inter alie:

- Pri hebreoj en la pitoreska urbeto Tykocin plena de hebreaj spuroj
- Pri ortodoksoj en la fama urbeto Supraśl
- Pri katolikoj en la sanktejo Sankta Akvo
- Pri islamanoj en Bohoniki kaj Kruszyniany

*Loka Kongresa Komitato*

Pli da informo ĉe ***espero.bialystok.pl/eo/keli/*** kaj en sekvonta numero de Dia Regno.

# Kun la suno mi leviĝas

(originale verkita en Esperanto)




2. Libervole aŭ dungite,
ĉu el dev', ĉu el pasi'.
    por komuna bon' aŭ propra
    agas, verkas, kreas mi.
|: Dio benu miajn farojn.
Kaj miaj faroj benu Lin. :|

3. En printempo mi ekfloras,
staras dum somer' en fort',
    en aŭtun' mi frukton donas
    ĝis en vintro venos mort'.
|: Dio benu mian vivon.
Kaj mia vivo benu Lin. :|

KUN LA SUNO MI LEVIĜAS • M kaj E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2022-06-21, la tagon de la somera solstico, 2022-06-28